

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

MAJO 2005

FORPASIS LA PLEJ ESPERANTA PAPO

Papo Johano Paŭlo la 2-a mortis en Romo la 2an de aprilo. Li restos en la memoro de la esperantistaro interalie ĉar li aprobis la uzon de nia lingvo por la tuta katolika meso (la oficialigo de esperanto eĉ helpis al la oficialigo de kelkaj minoritataj lingvoj); li benis ĉiam en esperanto je Kristnasko kaj Pasko, ekde printempo 1994; kaj li restos, speciale por ni Esperantianoj, kiel brila ekzemplo de transnacia identeco.

Li estis la sola ŝtatestro en la mondo, kiu sisteme mem uzis la internacian lingvon kaj ne nur esprimis por ĝi simpatian. En tiu senco Johano Paŭlo la Dua trapasis la logikon de la interŝtata vivo por eniri en la multkulturan kaj plurisman socion, en kiu troviĝas la Esperantio. Estas vero ke de sia naturo li estis talenta poligloto, sed estas ankaŭ vero, ke li laboris multe sur si mem, por posedi tian scipovon. Li parolis al bretonoj bretone, al rutenoj rutene, al indianoj "indiane", fine al esperantistoj esperante. Li ja ne bezonis tion fari, li povis limiĝi al unu lingvo, dum li elektis "ĉiujn" lingvojn. Eĉ se ĉi tiu gesto multfoje havis nur simolan valoron, ĝi atestas pri personeco plena de kulturo kaj respekto por ĉiuj, spite al la logiko de la nuna mondo. (HEKO-N^o 266)

NOVA LIBRO

“El hombre que desafió a Babel”

La hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi jam estas en finita. Madrida Esperanto Liceo intencas prezenti la libron en la venonta kongreso de Alcalá de Henares. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS KAJ DUM la HEF-Kongreso, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferon: po 23 eŭroj vi ricevos **“El hombre que desafió Babel”** kaj **“Nuevo Método de Esperanto”**; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Esperanto Liceo de Madrid de
Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

EXPOLINGUA 2005

Parte subvenciita, budo Esperanto denove estis en Expolingua. Krom la kutimaj informiloj ("Unua kontakto", "Tom da gramatiko", "Pasporta Servo", "Esperanto en Internet", "Perkoresponda kurso"....), ĉijare prezentiĝis la flugfolio "Donkiĥoto parolas esperanton", kun pluraj dulingvaj citoj el la verko. Kiel kutime oni muntis ekspozicion de libroj kaj diskoj kaj en komputilo oni montris tre interesan materialon interalie la videon farita antaŭ kelkaj monatoj de la madrida televid-ĉeno Localia..

La oficiala programo inkludis du prelegoj: prezentado de la Projekto Kihoto 2005 far José Antonio del Barrio, kaj enkonduko en esperanton (ĉefaj trajtoj de la lingvo por ĵusaj interesiĝintoj) far Alejandro Pareja.

Por vendado, oni disponis lernolibrojn, vortarojn (oni vendiĝis PIV-on kaj la Grandan Vortaron Hispana-Esperanton), Kihotojn, Asteriksojn, K-diskojn kaj alispecan materialon. Per ili ni enspezis la rekordon de preskaŭ 500 eŭrojn!

Kaj jen la ĉijara anekdoto: hazarde vizitis la budon pranepino de Vicente Inglada, unu el niaj pioniroj. Nu, ŝi promesis iam sekvi la spurojn de la praavo kaj eklerni la lingvon.

HISPANIO

Manolo Pancorbo informas ke jam estas preta la DVD-versio de filmo "El coche de pedales" kun esperantlingvaj subtitoloj.

Por unuiĝi la andaluzaj esperanto movado ĵus aperis, momente kastillingve, www.esperanto-andalucia.org: novaĵoj, kursoj, enketoj, artikoloj de ĵurnaloj, arĥivoj, forumoj... kaj, informoj pri la diversaj andaluzaj provincoj. La unua forumo estas "Enseñanza del esperanto"

La Universitato de La Laguna ofertas la jam sepjaran liberelektan seminarion por la universitataj studentaro kadre de la Fakultato pri Filologio (Lingvistiko) "Enkonduko al Esperanto kaj al sia kulturo" (instruado de la lingvo, historio kaj kulturo de Esperanto kaj pri aliaj planitaj lingvoj (interlingvistiko). Tri akademijaj kreditoj kaj tridek docentaj horoj.

4-A CENTJARI ĜO DE "EL QUIJOTE"

Oni rekomendas viziti la ret-paĝaro de HEF por vidi la desegnojn ricevitaĵajn de diversaj infanoj kaj junuloj jen siaj komentoj:

//www.esperanto-es.net/quijote//

Don Kihoto estis forta nur en buŝo. Mi devus fermi okulojn por ekkredi,
ke li estas kuraĝa

Movigis lin vento kaj li volis batali!

Li estas pli bona por knaboj, sed mi povas ridi pro liaj aventuroj

Li ne plendis, ke doloras, ne enuigis

Li estas stranga kaj amuza, sed ja ĉiu povas esti tia

Don Kihoto tre volis esti bona kaj tio gravas

Esperanto estis en la legado senpaŭzo laŭtlegado de El Quijote la 23-an de aprilo en la lautlegado ĉe Círculo de Bellas Artes. Legis Toño del Barrio, Mirjam Larissa Walter, F.Javier Moleón kaj Manuel Parra.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), dum aliaj tagoj vi povas faksi au telefoni al 91 446 80 79 au kontakti rete admin@esperanto-es.net



Hispana Esperanto-Kongreso 2005

Alcalá de Henares · de la 7a ĝis la 10a de julio

En loko de La Mancha, kies nomon vi nepre memoru –Alcalá de Henares–, okazos la 64^a Hispana Kongreso de Esperanto. La kongresejo: Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca. Plza. de San Julián, 1. Alcalá de Henares. Tre centra loko, proksime de "Plaza de Cervantes".

La Internacia Jaro de Fiziko kaj la centjariĝo de la Unua Internacia Esperanto Kongreso en Boulogne-sur-Mer havos lokon en la programo de la kongreso de Alcalá kiu havos aliajn interesajn programerojn: prezentado de la "Kosmologia Suito" de Pedro Vilarroig; stelrigardada astronomia nokto, aranĝita de David Galadí; prezentado de la hispanlingva animacio "Donkiĥoto kaj la malkomunikiga sorĉo" de José Rodríguez; traduk-ateliero gvidota de Liven Dek... Aparte Alcalá estas belega urbo kun grava historio kaj imponaj monumentoj. Ĝi aparte viglas vespere dank' al ĝia universitata studentaro. Gaja etoso do por la junuloj. Ne hezitu do, venu kiĥoti kun ni en Alcalá!

OMA ĜO AL FERNANDO DE DIEGO. Donkiĥoto parolas esperanton dank'al Fernando de Diego, la majstra reganto de la lingvo, kiu ebligis tiun ensorĉon. Dum la kongreso la hispanlingva esperantistaro montros sian dankemon al la homo, kiu paroligis esperanton al la plej universala heroo el nia literaturo. "Fernando de Diego, ĵurnalisto kaj filologo, estas la aŭtoro de la "Gran Diccionario Español-Esperanto" (50.750 kapvortoj), kaj de du eseoj pri traduk-arto kaj literatura kritiko. Sed lia originala verkaro minimumas en komparo kun lia enorma tradukado el la hispana kaj aliaj lingvoj en esperanton. Fernando de Diego estas ĥirurgo de la vorto: la rigoro, la alĝustigita frazo, la perfekteco kaj, ĉefe, la lerteco, distingas la probable plej bonan stiliston kaj vortoriĉan aŭtoron en esperanto" (Antonio Valén, postkovrilo de "Nuevo método de esperanto", Ed. Gram. Madrid 2001).

"Ĉiuj postaj tradukemuloj devas vole-nevole sekvi liajn paŝojn aŭ fiaski. Sed ne malpli grava pruviĝas lia influo ankaŭ en la originala beletro, en la lingvaĵo kaj stilo de almenaŭ, sed ne nur, la verkistoj de la ibera grupo". (Jorge Camacho, kongresprelego "Influo de Fernando de Diego en la originala E-beletro")

"Ido de l' akvo, hule, plaŭde, ŝaŭme
vi tajlas parolkonkojn. Puntas dirojn.
Pedante? Ne. Torente? Ne. Vivtakte!
Tra via plumo fontas
vi mem sen artifiko.
El via plumo lirlas
plurdimensia belo, ho amanto
de la kolor', sonor', sapor' de l' vortoj!"

(Miguel Fernández, el la "Omaĝo en oda kleo al Fernando de Diego" de la verko "El la sonoraj soloj". Eld. IEM, 1996)

Ja ne mankas kialoj por la omaĝo. Venu do kunfesti ĝin en la kongreso. Kaj nepre legu liajn verkojn, elektu inter ili laŭ viaj preferoj kaj ŝatoj: ne ekzistas pli bona komplimento al kvalita verkisto ol ĝui la rezulton de ties talento kaj peno.

Augusto Casquero bonvolos akcepti la prezenton en la Kongreso ne nur de la filmoj de Dobrzynski pri Fallas kaj Rio de Janeiro, sed eble ankaŭ de la samautora filmo esperantlingva "La siegho de Malbork", prezentita dum la pasintjara Kongreso en Cheste de la Valencia-Murcia E-Federacio.

Pli da informoj pri la kongreso ĉe: <http://www.esperanto-es.net/congreso2005/>

Kongreskotizoj cuxraj	Ĝis 31a de majo	ekde la 1a de junio
HEF-ano	30	39
ne HEF-ano	36	45
juna HEF-ano	21	27
juna ne HEF-ano	27	33

Pagu vian kotizon per unu el jenaj kontoj: **BBVA:0182-1252-33-0201517592** aŭ **UEA: hefb-m**
Sendu la pagpruvilon kun via nomo kaj adreso al la oficejo de HEF.

LABORA VIZITO AL UNESKO

La prezidantbto de UEA, Renato Corsetti faris laborviziton al la sidejo de Unesco en Parizo. Ricevis precipann atenton la kunlaboro de Unesco kaj UEA por la programo de la kulturo de paco, en ĝi elstaras la esperanta eldono de la Manifesto 2000 kaj la kolektado de subskriboj por ĝi. La respondeculino de la Jardeko por Kulturo de Paco akceptis envicigi la projekton Esperanto por evoluo en la kadron de la Jardeko. (Ondoj de Esperanto n° 3-2005)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3°-7 Tel. 91 446 80 79.

30 – an de majo Centro Cultural Espronceda (c/ Almansa 6- Cuatro Caminos), je la 19.30 Toño del Barrio prelegos pri "El Quijote y sus traducciones al esperanto"

10 – an de junio je la 19,00 h Ateneo de Madrid (c/ Prado 21) prezentado de la poemaroj de Jorge Camacho:

La membroj de MEL kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3°-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, NOVA KONTO Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730



ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid

Ĉion ĉi aŭskultis unu el la ekortisto de la kaleŝo. Li, kiu estis vasko, vidante ke Don Quijote ne lasas pasi la kaleŝon, kaj ke li volas, ke ĝi turniĝu kaj iru al El Toboso, proksimiĝis al nia hidalgo, prenis lin je la lanco kaj diris en fuŝa kastilia lingvo, eĉ en pli fuŝa vaska:—Iru, sinjoro, prenu vin diablo. Kiel Dio kreis min, ke vi laŝas kaleŝon se morti ne kiel vaska mi.

Todo esto que don Quijote decía escuchaba un escudero de los que el coche acompañaban, que era vizcaíno, el cual, viendo que no quería pasar el coche adelante, sino que decía que luego había de dar la vuelta al Toboso, se fue para don Quijote y, asiéndole de la lanza, le dijo, en mala lengua castellana y peor vizcaína, de esta manera: —Anda ,caballero que mal andes; por el Dios que criome, que, si no dejas coche, así te matas como estás ahí vizcaíno.

1ª parte, capítulo VIII

Nenia libro tiel mavaas, ke gi ne havas ion bonan.

No hay libro tan malo que no tenga algo bueno.

2ª parte, capítulo III

Ili bojas, do ni vojias (*)

Ladran, luego cabalgamos

Apócrifo atribuído a Don Quijote

Don Quijote habla esperanto



“ ...el cual me dijo en lengua que ni es morisca, ni castellana, ni de otra nación alguna, sino una mezcla de todas las lenguas, con la cual todos nos entendemos.”

“ ...li alparolis min en lingvo nek kastilia, nek maŭra, nek apartenanta al ajna nacio, sed mikso de ĉiuj lingvoj kaj per ĝi oni interkompreniĝas.”

1ª parte, capítulo XLI, historia del cautivo

Federación Española de Esperanto Rodríguez San Pedro 13-3º-7 ES-28015 Madrid Tel./Fax: +34 914 468 079 www.esperanto-es.net info@esperanto-es.net	Grupo o asociación local:
---	---------------------------

Todos los textos en esperanto están tomados de la traducción de *Don Quijote* por Fernando de Diego, salvo

(*) traducido por Manuel Pancorbo

versión 2005 02 28 · folleto disponible en www.esperanto-es.net

En vilaĝo de La Mancha, kies nomon mi ne volas memori, antaŭ nelonge vivis hidalgo el tiuj kun lanco en rako, antikva ŝildo, osta ĉevalaĉo kaj rapida levrelo. Stufaĵo pli ofte bova ol ŝafa en la matenoj, haketita viando kun salo preskaŭ en ĉiu nokto, grivoj kaj frititaj ovoj sabate, lentoj vendrede, kaj plie kolombido dimanĉe prenis tri kvaronojn de lia enspezo. La alian kvaronon konsumis velura saĵo, pluŝaj kuloto kaj pantofloj por la festaj tagoj, dum en la cetero de la semajno li kontentiĝis portante delikatan lanaĵon.

El comienzo

...ŝajnas al mi, ke traduki el unu lingvo en alian (se oni esceptas la suverenajn lingvojn grekan kaj latinan), similas rigardi la renverson de flandra tapiso, ĉar, kvankam la figuroj ankaŭ tie videblas, ili ne montras la glaton kaj brilon de la ĉefa flanko, ĉar duonkaŝitaj de la fadenoj. Kaj traduki el facilaj lingvoj ne implicas la posedon de pli da talento au da stilo ol necesas por kopii ion el unu papero en alian. Nu, mi ne volas diri, ke la tradukarto estas ne laudinda: efektive, oni povus okupi sin per aliaj pli mavaĵ kaj malpli profitaj afero.

2ª parte, capítulo XLII

En un lugar de la Mancha, de cuyo nombre no quiero acordarme, no ha mucho tiempo que vivía un hidalgo de los de lanza en astillero, adarga antigua, rocín flaco y galgo corredor. Una olla de algo más vaca que carnero, salpicón las más noches, duelos y quebrantos los sábados, lentejas los viernes, algún palomino de añadidura los domingos, consumían las tres partes de su hacienda. El resto de ella concluían sayo de velarte, calzas de velludo para las fiestas, con sus pantuflos de lo mismo, y los días de entresemana se honraba con su vellorí de lo más fino.

...me parece que el traducir de una lengua en otra, como no sea de las reinas de las lenguas, griega y latina, es como quien mira los tapices flamencos por el revés, que aunque se veen las figuras, son llenas de hilos que la oscurecen, y no se veen con la lisura y tez de la haz; y el traducir de lenguas fáciles, ni arguye ingenio ni elocución, como no le arguye el que traslada ni el que copia un papel de otro papel. Y no por esto no quiero inferir que no sea loable este ejercicio del traducir; porque en otras cosas peores se podría ocupar el hombre, y que menos provecho le trujesen

*(pri la libro “Don Quijote”)
kaj mi kredas, ke ne ekzistos regno, en kies lingvon oni ne tradukos ĝin.*

...mia natura inklino igis min peti de la knabo unu el la kajeroj, kaj mi rimarkis ĝin skribita per arabaj literoj. Mi bone konas ilin sed ne scias ilin interpreti, do ĉirkaŭrigardis, ĉu tie staras mudeharo, kiu volus ĝin legi; ne estis malfacile renkonti unu tian, ĉar tie troveblas interpretistoj eĉ de pli bona kaj antikva lingvo.

La kirko nin frontas, Sancho.

*(sobre el libro “Don Quijote”)
y a mí se me trasluce que no ha de haber nación ni lengua donde no se traduzca.*

...llevado de esta mi natural inclinación tomé un cartapacio de los que el muchacho vendía y vile con caracteres que conocí ser arábigos. Y puesto que aunque los conocía no los sabía leer, anduve mirando si parecía por allí algún morisco aljamiado que los leyese, y no fue muy dificultoso hallar intérprete semejante, pues aunque le buscara de otra mejor y más antigua le hallara.

Con la iglesia hemos dado, Sancho.

2ª parte, capítulo III

1ª parte, capítulo IX

...kvankam oni silentigis al ni la langon, tamen oni ne povis haltigi la plumojn, kies strekoj, pli libere ol la langoj, konfesas al la amata persono la plej sekretajn pensojn de la animo, pro tio, ke ofte okazas, ke en la ĉeesto de la persono amata mutiĝas en konfuzo la plej rezoluta intenco kaj la plej aŭdaca lango.

...aunque pusieron silencio a las lenguas, no le pudieron poner a las plumas, las cuales, con más libertad que las lenguas, suelen dar a entender a quien quieren lo que en el alma está encerrado, que muchas veces la presencia de la cosa amada turba y enmudece la intención más determinada y la lengua más atrevida.

1ª parte, capítulo XXIV

2ª parte, capítulo IX